

TEA-BULTENO

16^A JARO

MARTO - APRILO 2013

NUMEROJ 3-4

Astronomio instruis al ni, ke ne ni estas la universo-centro. Ni estas nura eta planedo ĉirkaŭiranta tre ordinaran stelon. Ni mem, inteligentaj estaĵoj, estas rezulto de stela iom-post-ioma evoluo, faritaj el la sama astra materio.

(Margherita Hack - astrofizikisto - Florenco, 1922)

Jara Asembleo de TEA la 17^{an} de februaro 2013

Raporto de la prezidanto

Estimataj Asocioj, karaj gemikoj,

Alia jaro de intensa agado pasis. Certe vi bone memoras la plurajn eventojn kiuj karakterizis la pasintajn 12 monatojn. Bedaŭrinde ne ĉiuj el vi partoprenis: certe ĉiu havas sian specialan kialon por malĉeesti la programojn de nia asocio, sed de tempo al tempo iom da subteno ni tamen bezonus. Kelkfoje esti inter la publiko multe helpas la organizantojn, ĉar se ni mem ne interesiĝas pri l' afero, kial aliaj personoj devus? Se la esperantistoj ne partoprenas en aranĝoj kie Esperanto havas gravan rolon, por subteni, por montri al la cetera mondo ke nia specio ne malaperis, kial neesperantistoj interesiĝu?

Nia valorega sekretariino listigos detale la okazintaĵojn de 2012, sed mi volas altiri vian atenton nur pri tri aranĝoj, la plej gravaj.

En februaro ni denove kaj iom pli atente celebris la tagon de la patrina lingvo: tre sukcese, oni devas tion rekoni, ĉar partoprenis ankaŭ la Konsulo de Kroatio en Triesto kaj aliaj eminentaj gastoj.

En majo, enkadre de eŭropa projekto iniciatita de Eŭropa Esperanto-Unio, ni kiel ties partneroj organizis internacian konferencon en kiu partoprenis gravuloj kiaj nia eksa Ministro pri eksterlandaj aferoj Gianni de Michelis, iamaj prezidantoj de Slovenio kaj Kroatio, unu eŭropa

itala parlamentano kaj aliaj personoj, fakuloj pri la diversaj temoj pritrakitaj.

Amaskomunikiloj dediĉis al la aranĝo grandan atenton. Ĝi plene sukcesis kaj vere ni povas esti tre kontentaj pri la rezulto. Ĉio glate kaj senprobleme funkciis. Mi devas menci, ke pro tiu ĉi Konferenco la Prezidanto de nia Respubliko, Giorgio Napolitano, honoris nin per speciala medalo, kiun poste vi povos admiri.

En decembro, enkadre de la projekto "Lingvoj kaj kulturoj en Triesto", realigita per kunlaboro inter ni kaj Asocio Poezio kaj Solidareco, *Centro Unesco* de Triesto, *Fondazione Ellenica di cultura* kaj *Comunità Greco-Orientale*, ni povis ekspozicii en la Salono Jubileo multajn desegnaĵojn el tiuj ricevitaĵoj okaze de la lasta Kristnaska Konkurso. Bedaŭrinde la ejo montriĝis ne aparte taŭga por altiri publikon, sed tiuj, vizitintaj ĝin, vere entuziasmiĝis. La kunlaboro kun tiuj grupoj estis tre bona kaj certe plu daŭros estontece.

Kiel mi diris komence, la 2012-a estis jaro laborplena, cetere kiel devus esti ĉiam ĉiu jaro.

La ekziston de nia Asocio pravigas ĝuste la pluraj agadoj planitaj kaj realigitaj por montri publike ke nia internacia lingvo Esperanto estas utila, ke ĝi rolas tute same kiel ĉiu alia lingvo de nia planedo en la multfacetaj kulturaj kaj homaj cirkonstancoj, ke esperantistoj ne estingiĝis kaj plue aktivis por realigo de la Zamehofaj idealoj. Ni ja

estas "atestantoj", ne de Jehovo sed de Esperanto, kaj oni devus ĉiam konscii ke nur per nia ekzemplo, per nia persisto kaj laboremado, la internacia lingvo povas disvastiĝi kaj akiri la necesan subtenon kaj konsenton. Oni ne parolu pri la "fina venko", ĝi estas malproksima kaj ĝia atingo tute ne certas, krome mi certe ne vidos ĝin. Tamen ni esperantistoj devus konduki kaj labori kiel se tiu venko povus okazi postmorgaŭ.

Pro tio, ankaŭ en tiu ĉi asembleo mi alvokas por pli da kunlaboro, por pli da partopreno. Mi scias, ke ne ĉiam estas facile, sed per iom da bonvolo kaj engaĝiĝo ni ĉiuj estos pli kontentaj. Jes, ankaŭ vi estos pli kontenta, ĉar vi havos la senton ke ne vane vi membriĝas en TEA, ke io utila estas farita por vivigi nian asocion, por permesi al aliaj personoj ĝui la eblecojn proponitajn de Esperanto kaj ĝia movado, por riĉigi nian kulturan posedaĵon. Ni devas fieri pri nia kapablo alparoli la mondon pere de Esperanto kiu permesas al ni esti mondĉivitanoj kaj ne lingvaj subuloj.

Do ... mi finas per la samaj vortoj kiel pasintjare: Se ĉiu el ni disponigos al TEA iom da tempo kaj entuziasmo, ni povos realigi multon kaj dank' al tio konsenti al novaj generacioj celebri la 200^{an} datrevenon de la fondiĝo de nia asocio.

Vivu TEA kaj Esperanto!

Edvige Ackermann

Atentigo. Kune kun ĉi bulteno, krom raportoj pri la jara aktivado, vi trovos ankaŭ la poŝtpagilon por re-novigi vian membrecon al TEA. Memoru, ke tre gravas via helpo por pluekzisto de Triesta Esperanto-Asocio, kies ĉefa celo estas la diskonigo kaj disinformado de nia komuna lingvo Esperanto.

Dankon pro Via subteno! TEA-estraro

Raporto de la sekretariino

Tre estimataj TEA-anoj! Jen alvenis la momento por kune rememori la faritan agadon de TEA en la 2012-a jaro. Kiel kutime, ni komencu per tra-rigardo de la diversaj okazintaĵoj.

✓ **24 februaro** – Por inde festi la Internacian Tagon de Patrino lingvo, estis lanĉita la projekto “LA PATRINA LINGVO, JE L’ RADIKOJ DE IDENTECO”. Partoprenis en ĝi ĉirkaŭ 30 personoj. Prelegantoj estis prof-ro P. Alessi, kiu parolis pri “Unesco kaj la patrino lingvo”, prof-ino G. Valera Gruber, pri “Lernitaj lingvoj kaj patrino lingvo: prikonsideroj”, prof-ro Aldo Colleoni pri “Mongola lingvo, antikva idiomo”, Marija Belošević pri “Libro, fenestro por dialogi” kaj prof-ino Sanja Vulić, Universitato de Zagrebo, pri “La kroata lingvo kaj kroata identigo”. Ĉeestis ankaŭ la konsulo de Kroatio en Triesto.

17 novembro – Enkadre de la sama projekto, okazis ĉe Salono Beethoven la spektaklo “KANTANTE MIAN TRIESTON”, en kiu partoprenis P. P. Sancin, A. Colautti, la paro Jurcev, S. Vidmar kun *Fisorchestra* 2001 kaj C. Moser. La aranĝo ricevis la subtenon de Regiono Friulo Julia Venetio.

✓ Sekve de la intenco malaperigi la triestan Fervojan Muzeon, TEA iniciatis Kampanjon “Ni savu la Fervojan Muzeon en Triesto”, inter esperantistaro, ĉefe fervojista, kiu vigle reagis sendante protest-mesaĝojn al urbestro, provincestro, tagĵurnalo *IL PICCOLO* kaj aliaj aŭtoritatuloj kun propeto nuligi tiun decidon. La konata ĵurnalisto/verkisto Paolo Rumiz skribis artikolon en *LA REPUBBLICA*, en kiu li menciis mesaĝon senditan de la IFEF-kasisto Laurent Vignaud. La **28-an de marto** venis al Triesto Martin Stuppig kun la urbestro de Arnoldstein, Eric Kessler, kiuj vizitis la Fervojan Muzeon, bonvenigitaj de d-ro Claudio Vianello, Prezidanto de Kultura Fervojista Asocio, kaj s-ro Steffè. Poste oni estis akceptitaj en la urbodomo de vicurbestro d-ino Fabiana Martini. Al ŝi oni transdonis la broŝuron enhavantan la protestleterojn rilate al Muzea fermo.

✓ **9-11 majo** – La plej grava evento de la jaro estis la eŭropa kunveno, kun jena ĉeftemo: KIA ESTUS EŬROPA NUN, SE NE EKZISTUS EŬROPA UNIO? La projekto, iniciatita de Eŭropa Esperanto-Unio, estis realigita danke al la kunlaborado de asocioj el tri landoj. Plej notinda afero estis la tuta prelegaro, interpretata en tri lingvoj: angla, esperanta kaj itala. La prelegantaro, inter kiuj menciindas Stjepan Mesić, prezidinto de Kroatio, Milan Kučan, prezidinto de Slovenio, Antonio Cancian, eŭropa parlamentano, François Grin el Universitato de Ĝenevo, Giorgio Rossetti, eksa eŭropa parlamentano, Gianni de Michelis kaj aliaj gravuloj, vekis viglan intereson de lokaj ĵurnaloj, de RAI kaj de Slovena televido. Nun, zorge de EEU, estas en preparo 3-lingva libro, en kiu legeblas la tekstoj, prezentitaj de la oratoroj. Komprenoble ankaŭ TEA-anoj kontribuas en la tradukada kaj korektada laboroj.

✓ Fine de la Eŭropa Konferenco, je la **12-a de majo**, Alp-Adrianoj renkontiĝis por preparoli la estontecon de Alp-Adriaj Esperanto-Konferencoj. Dum la diskutado, s-ino Fani Rižnar informis pri sia deziro ĝin organizi, en 2013, en Izola. Sekve de ŝia propono, kiu estis unuanime akceptita de la ĉeestintoj, TEA deklaris sian pretecon kunlabori por sukcesa realigo de tiu aranĝo.

✓ **26 aŭgusto** – Ni ĉeestis la Feston de Kulturoj en *Domio*, kiu titoliĝis: POEZIO, MUZIKO, KOLOROJ, GUSTOJ. Tiam estis prezentita poeziaĵo de Yeghishe Charents, armena poeto de la 20-a jc, en la esperantlingva traduko.

✓ **20-21-22 septembro** – Oni partoprenis en la Festo de Volontulaj Asocioj, ĉe Skolta Junulargastejo Alp-Adrio, en *Prosecco*, per priesperanta budo.

✱ Estis konkretigita de ASSOCIAZIONE POESIA E SOLIDARIETÀ/ASOCIO POEZIO KAJ SOLIDARECO, prezidata de prof-ino G. Valera Gruber, projekto disvolviĝinta kunlabore kun Centro Unesco Trieste, Kultura Asocio Friedrich Schiller, Greka Kultura Fondaĵo kaj Triesta E-Asocio. La projekto nomiĝas: “LINGVOJ KAJ KULTUROJ EN TRIESTO”: ĝi komenciĝis septembre 2012 kaj finiĝos marte 2013. Ĝi ricevis subtenon de Triesta Provinco.

✱ **9-23 decembro** – Ĉiam koncerne tiun projekton estis muntita fare de TEA-anoj en la Jubilea Salono - kunlabore kun la Greka Kultura Fondaĵo - ekspozicio pri Kristnaskaj desegnaĵoj faritaj de geknaboj el pluraj landoj.

✓ **Printempe, somere, aŭtune:** Karstaj Tagoj. Tiu ĉi jam tradicia, saniga kaj gaja agado okazis ankaŭ ĉijare kun bona partopreno de ekskursemuloj: aparte sukcesa estis tiu komence de novembro. Tiukadre estis aranĝita la **30-an de novembro** en Teatro Beethoven la spektaklo: MI RAKONTAS AL VI PRI KARSTO, prezentita de Alessio Colautti. Intervenis la slovena kulturasocio *Grad*, el *Banne*, kiu rakontis pri tradicioj, muziko, kostumoj kaj kuirreceptoj en tiu eta mondo, tiel proksima al Triesto kaj tiel diversa. Kantis ankaŭ la Virinvoĉa Ĥoro IVAN GRBEC el Servola.

☑ **En septembro** estis finfine lanĉita la konkurso pri pentroarto, siatempe proponita de Alessandro Soranzo. La koncerna premia ceremonio okazos en decembro 2013. Oni intertempe estas propagandanta ĝin ĉe lernejoj, kulturaj asocioj, ĵurnaloj ks.

❖ **Enklubaj programoj:** dum la vendredaj vesperoj oni povis aŭskulti legaĵojn el la libroj eldonitaj de Ludovikito, partopreni en interesaj konversacioj, gvide de Ennio Gerolini, pri “Triesta Dialekto”, spekti fotojn pri Arkitekturo en Prago kaj pri Armenio (Elda), pri Londono (Alan k Erica) kaj pri “Triestanoj kaj ne, en la lastjaraj eventoj”, far de Anita. Oni komencis denove legi Kantojn el la **INFERO** de Dante, komparante la Esperantan, italan kaj triestan versiojn.

❖ **Esperantistaj gastoj en Triesto:** dum la jaro vizitis nin Marija Belošević el Zagrebo, Elda kaj Alessandro Corrado el Brescia, Antonio De Salvo el Roma, Folkmar Koller el Vieno, Alain Remy el Tulono, Fany Rižnar el Ljubljana/Izola.

➤ **Pri kongresoj/renkontiĝoj:** Edvige kaj Elda ĉeestis junio-julie la Internacian Esperanto-Semajnon en Armenio; aŭguste Elena kaj Edvige partoprenis en la Itala Kongreso okazinta en *Marzara del Vallo* kaj, duone de oktobro, Elena ĉeestis la Montkabanen Renkontiĝon en Lovran.


26 majo – Vizito en Kaŝtelir de s-ino Kata Trampuh, okaze de morto-datreveno de la kara Marĉelo.

22 julio – Gaje ni festis kaj kunestadis, kiel jam tradicie, ĉe nia anino Anita.

9 septembro – Ni partoprenis en la tradicia Festo de Amikeco sur Monto *Forno*, kie ni renkontiĝis kun Martin Stuppig, ges-roj Zdravec kaj alia sloveno.

daŭrigu je la 5-a paĝo ➤



Kun subteno de  **PROVINCIA di TRIESTE**


kaj enkadre de la projekto
LINGVOJ KAJ KULTUROJ EN TRIESTE

vendredon la 1^{an} de marto 2013 - h. 18
ĉe Librejo *La Fenice* (*Galleria Fenice, 3*)
estos prezentitaj du libroj, verkitaj en
esperanto kaj tradukitaj itallingven.

Temas pri "*Robinson in Siberia*" (Modernaj
Robinzonoj) kaj "*Ballo in maschera a Bu-
dapest*" (Maskerado ĉirkaŭ la morto)
ambaŭ verkoj de la hungara esperantisto
Tivadar Soros.

Ĉeestos la tradukistino
Margherita Bracci Testasecca
kaj la eldonisto **Paolo Gaspari.**

Enkondukos kaj prikomentos
d-ino Renate Grim.



Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Ĉu vi kuraĝas alfronti la ĉimonatajn demandojn?
Certe ke jes, sed ne tuj iru al paĝo 5^a por legi la
respondojn! Iom cerbumu prie!

- 1) De kiu estis projektita kaj en kiuj jaroj konstruita
la *Mirammar*-kastelo?
- 2) En 1997 la statuo de Imperiestrino *Sissi* eliris el
sia "ekzilejo" kaj estis restarigita antaŭ la fervoja
stacidomo, de kie ĝi estis "formovita" en 1941.
Ĉu iam ajn la Imperiestrino vizitis Trieston?
- 3) Kiu fama muzikisto, en 1816, koncertis en Trie-
sto, kun ĉefa celo viziti la fratinojn de *Napoleone*
Bonaparte, *Elisa Baciocchi*, kun kiu li havis amri-
laton?
- 4) La familia nomo de astrofizikistino *Margherita*
Hack estas visdevena. Neniu dubas pri ŝia
"triestaneco", malgraŭ ŝia tre simpatia parolma-
niero tipe florenca. Kial?

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - mardo 17-19; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Grupa tt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/

Associazioneesperantistatristina - www.esperantotrieste.it

Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349



Triesta recepto

Eniris la tradician kuirarton trie-
stan pluraj bongustaĵoj, kiuj foje
tamen iom da perplekseco vekas
en la nelokanoj. Iom da dubemo
pri frandindeco okazas kiam oni
surtabligas, kiel unuan pladon, ekz. terpomajn bul-
etojn farĉitajn per prunoj aŭ marmelado, ĉar ordi-
nare oni pensas, ke tiuj devus esti servataj kiel
dolĉaĵoj. Male tiuj konsistigas la ununuran pladon,
ĉar eĉ plej pretendemaj stomakoj plensatiĝas post
manĝo de kelkaj el tiuj buletoj. Hodiaŭ mi propo-
nas al vi recepton preskaŭ similan, ŝanĝiĝas nur la
farĉo: kredis min, valoras la peno eksperimenti ĝin!

Terpomaj buletoj farĉitaj per juglandoj

Ingrediencoj:

200 g da hakitaj juglandoj
20 g da rosinoj
75 g da sukero
50 g da butero
1 kulero da pinfruktoj
1 ovoblanko ŝaŭme pufigita
1 ovoflavo
iom da rumo
raspitaĵo de citrona ŝelo
butero, sukero kaj raspita pano
por kondimentoj

Preparado:


Unue pretigu la kutiman pastaĵon el terpomoj, fa-
runo, ovo, salo (k.b.) kaj moligu la rosinojn en var-
ma akvo miksitaj kun iom da rumo. Poste miksu la
juglandojn kun la sukero, dispremitaj rosinoj, ci-
tronŝela raspitaĵo, pinfruktoj, ovoflavo, moligita
butero kaj laste aldonu tre delikatomove la ŝaŭme
pufigitan ovoblankon. Per la terpoma pastaĵo pret-
igu longajn ne tro dikajn bastonetojn, kaj tiujn dis-
tranĉu en diversajn pecetojn, grandajn pli-malpli
kiel aprikotojn. Platigu la pastaĵon kaj centre en-
metu kuleregon da farĉo: post tio formu bulon, zorg-
ante ke ne eliĝu la farĉo; iomete farunumu ĝin.
Kiam ĉirkaŭ 6-8 da tiuj estos pretaj, kuiru ilin dum
kelkaj minutoj en alta poto plena je bolanta akvo,
iom salita. Kiam ili flosas surface, ilin elprenu per
borita kulerego kaj metu en grandan teleron. Kiam
ĉiuj estos kuiritaj, surverŝu raspitan panon antaŭe
fritetitan en butero kaj fine surŝutetu per iom da
sukero kaj muelitaj juglandoj. Surtabligu la bul-
etojn varmetaj aŭ malvarmaj, laŭ prefero, kaj ...
Bonan apetiton!

Brazila anekdoto, aperinta en la nica literatura revuo

Riĉa brazilano, timigita de la okazaĵoj en la 1942-
jara Londono, ŝipiras hejmen, kun sia papago, kom-
preneble. La Atlantiko iom tumultas, kaj la papago
eksentas marmalsanon. "Nu, kara, - ŝi diras -, la
ĉefa afero estas tute ne pensi pri la maro. Por distri
vin, ĉu vi volas, ke ni ludu kune?" "Jeees, jeees"
plendas la papago. "Nu, atentu. Mi kalkulas ĝis tri,
kunfrapante miajn manojn, kaj tiam ni komencos
la ludon. Preta? ... Unu, du, tri!" Kaj je tiu tri, la
ŝipo, renkontinte germanan flosminon, eksplodas
ĉielen. Kiam ĉiuj pecoj refalis sur la maron, la pa-
pago, senplumigita, kun unu ŝvelanta palpebro,
alkroĉite al naĝanta trabo, konkludas: "Tiu ludo
estas komplete idiota."

Laste trovitaj!

Jen interesa historia karto, kiun - mi certas! - altiros vian atenton! Ĝi tamen ne rilatas al Esperanto, sed al Ido. Fakte la karto, sendita la 8^{an} de septembro 1913 al "Sioro H. Thomson, Chicago, Usono", estis skribita kaj subskribita de Louis Couturat. Bedaŭrinde ne plene kompreneblas la teksto, precipe pro mal-



facile legebla skribo, tial mi ne kuraĝis ĝin traduki al Esperanto. En ĝi estas citita ankaŭ 'S^o de Beaufront', kiu - laŭ mia kompreno -

devis rebati al artikolo aperinta en "La Ondo". Poste li parolas pri iu 'Kotzin', kiu rifuzas publikigi liajn artikolojn pri diversaj argumentoj, i.a. pri 'la supersigni'. "Li estas [...] fripono" - Couturat aldonas kaj konkludas sian mesaĝon per "Kordiala saluto e bondeziri".

Certe ĉiu el vi scias, kial aŭ kiel aperis sursceneje Ido, sed pli bone refreŝigi la memorojn, ĉu ne?

Louis Couturat (1868-1914) estis profesoro pri filozofio. En 1900, konstatinte la lingvajn problemojn dum la internaciaj kongresoj enkadre de la tutmonda ekspozicio en Parizo, per la broŝuro *Une langue universelle est-elle possible? Appel aux hommes de science et aux commerçants* li proponis la kreon de Delegacio por alprenado de lingvo internacia.



L. Couturat

Ĝia tasko estis varbado inter scienculoj kaj profesoroj tra la mondo, kaj diversaj sciencaj kaj kulturaj organizaĵoj. En 1903, kun Leopold Léau li verkis, france, "Historion de Universala Lingvo", en kiu estis analizitaj ĉirkaŭ 60 projektoj de paroleblaj artefaritaj lingvoj. De 1901 ĝis 1907 ili kolektis subskribojn de 307 asocioj kaj 1251 scienculoj, deklarantaj sian apog-on al elekto de internacia lingvo. En 1906 Couturat petis la Internacian Sciencon Akademion fari tiun elekton, sed ĝi rifuzis, nedezirante enmiksiĝi en tiun decidon. Sekve la delegacio, laŭ propono de Couturat, aranĝis elekton de 12-persona komisiono, kiu devis ekzameni la diversajn proponitajn lingvo-projektojn por fine prezenti la plej taŭgan sistemon. Laŭ peto de Zamenhof mem, Esperanto estis defendita de Louis de Beaufront. Post kelkaj kunsidoj kaj supraĵa esploro de la projektoj, foreste de multaj esperantistoj, oni prezentis rezolucion, laŭ kiu "pro la granda disvastiĝo de Esperanto kaj de ĝiaj sendubaj avantaĝoj" oni akceptu ĝin sed kun kelkaj ŝanĝoj, rilate al finaĵoj, pluralo, forigo de akuzativo kaj de tabel-vortoj. La esperantista Lingva Komitato devis rebati al tiu propono post unu monato. Tempo pasis, respondo ne venis ene de tiu limdato kaj Couturat prezentis projekton, en

Fonto: el Vikipedio, foto skanita en la privata biblioteko de P. Fiŝo, el "Analiza historio de E-movado"

kiu aperis la petitaj reformoj, kies nomo estis 'Esperanto (reformita)'. Dume la Lingva Komitato, interkonsente kun Zamenhof, sciigis pri sia rifuzo akcepti ŝanĝojn postulitajn de la Delegacio, sed tro malfrue. La Majstro alvokis la esperant-istaron, per cirkulera letero, resti fidelaj al Esper-anto, substrekante la fakton ke tasko de la Dele-gacio estis nur elekti, ne reformi. Plie, marte 1908, Zamenhof malpermesis ke la nova lingvo havu la nomon 'Esperanto', tial ĝi estis nomita IDO! Maje de tiu sama jaro Louis de Beaufront surprizis ĉiujn per sia subita invito al esperantistaro, akcepti la reformitan lingvon. Interalie li jam estis farinta alian lingvo-projekton, neniam publikigitan, kies nomo estis 'Adjuvanto' kaj kiu iele parencis al Ido. En junio, en la gazeto "L'Espérantiste", li deklaris sin aŭtoro (aŭ almenaŭ kunaŭtoro) de Ido kaj denove alvokis la esperantistaron rezigni pri Esperanto kaj ĝin adopti. Kie kaŝiĝas la vero? Tiu krizo bedaŭrinde influis tre negative ankaŭ la progresadon de Esperanto: pluraj esperantistoj ĝin forlasis kaj transiris al Ido, aŭ eĉ ne plu volis havi ian ajn rilaton al mondlingva problemo.

La efika reklamado pri Ido kompreneble altiris multajn adeptojn, ankaŭ ĉar oni kredigis ke - estante Ido ja ido de Esperanto, nome bazita sur preskaŭ ĉiuj ties avantaĝaj principoj, sed en formo pli perfektigita - ĝi estos pli facile lernebla kaj konsekvence pli rapide diskonigebla. En 1908 aperis la revuo 'Progreso', unue en Esperanto kaj poste en Ido kaj la postan jaron estis fondita la 'Uniono dil Amiki di la Linguo Internaciona', laŭ kies statuto kreiĝis la unua Ido-Akademio, kiun estris Couturat. Lia subita morto pro aŭtomobila akcidento en 1914 kaj la eksplodo de la 1-a mondmilito donis grandan baton al la tiam tro juna Ido-movado, sed kio plej malhelpis ĝian disvastiĝon estis la fakto, ke daŭre oni interdisputis pri enkonduko de novaj reformoj en la lingvon. Nuntempe ĝi plu vivas, precipe en interreto, kie oni povas viziti ĝian ĉef-ttt-ejon ĉe la adreso: <http://www.idolinguo.com/>. Italoj trovos pliajn informojn kaj precipe ĝian gramatikon alirante la retejon: <http://www.europa.idolinguo.com/Italia/>



Kia ĝia simbolo? Stelo sespinta. Ĝi estis kreita de la eksa esperantisto Pál Jankó, hungara idisto, unu el la pioniroj. Kial ses pintoj? Laŭ iuj ili simbolas la ses kulturajn lingvojn, el kiuj Ido naskiĝis (kiuj?), laŭ aliaj, la kontinentojn: Azion, Amerikon, Afrikon, Eŭropon, Aŭstralion kaj Oceanion(?). Ĝi aperis frontpaĝe de la "Kompleta gramatiko detaloza di la linguo internaciona Ido da L. de Beaufront".



Nuntempe idistoj alprenis pli modernan simbolon: jen ĝi maldekstraflanke!

En Ido-Vikipedio ekzistas pli ol 10 mil artikoloj, ne tiom ampleksaj, tamen... Sufiĉe regule okazadas Ido-konferencoj en Eŭropo jam ekde la jaro 1921-a. La pasintjara *Ido-konfero* okazis sukcesoze en Dessau, Germanio, en kiu partoprenis pli ol 100 Ido-movadanoj. Daŭre aperas 'Progreso', tri-foje jare, kosto: 10 €.

Fontoj: Historio de la mondlingvo, E. Drezen; Centjara asocia E-movado en Francio (3 kajeroj), H. Gonin k J. Amouroux; Ido-retejo; Vikipedio.

Respondoj al demandoj pri Triesto:

- 1) Komisie de arkiduko Maksimiliano de Habsburgo, ĝin projektis la viena arkitekto *Carl Junker*. Naskita en malriĉa kamparana familio en 1827, li iĝis inĝeniero en 1845. Li sindediĉis precipe al konstruado de akvoduktoj kaj akvokondukiloj. En 1847 li partoprenis en la laboroj por la farado de Suez-kanalo, sub direktado de ties projektinto *Luigi Negrelli*. La kastelo de *Miramar* estis konstruita inter la jaroj 1856 kaj 1860.
- 2) La statuo de *Sissi* estis skulptita de arkitekto *Francesco Seifert*, danke al publika monkontribuo, en 1912. Post naŭ jaroj la monumento, dispecigita, estis ĵetita en iun kastelan magazenenon, kie ĝi restadis ĝis 1997. *Sissi* ofte vizitis Trieston, gastigita de sia bofrato en la kastelo mem aŭ sur la fregato *Novara*, ankrita en rodo de la triesta golfo.
- 3) La mondkonata violonisto kaj komponisto *Nicolò Paganini* (1782-1840).
- 4) Ŝi naskiĝis en Florenco en 1922, ĉar la patro, *Roberto Hack*, laboris kiel ĵurnalisto en tiu urbo, samkiel ŝia patrino, miniaturisto ĉe la Art-galerio de l' Oficoj. Margherita kun sia edzo *Aldo de Rosa* vivas ekde la unuaj jaroj de 1960 en Triesto.

17^a ESPERANTO-KONFERENCO de ALP-ADRIO

Izola, Slovenio - 1-2 junio 2013

Konferenca temo:

IZOLA, PACA KUNVIVEJO DE TRI KULTUROJ

Interesa programo, kultura, muzika kaj ekskursiva pasigos al vi tre belan semajnfino en ĉarma, trankvila urbeto ĉemara. Eblas ankaŭ alveni pli frue aŭ plilongigi la restadon.

Pliaj informoj (programo, aliĝilo, prezoj de tranoktejoj kaj ekskursoj k.a.) riceveblas de

Francka RIZNAR
Koprska 32, 6310 Izola
fani.riznar@gmail.com

Konferenca sekretario
Edvige Ackermann nored@tiscali.it



La franca Esperanto-kastelo Greziljono prezentas la

staĝon PRINTEMPas

20-27 aprilo 2013 - intensivaj kursoj kun Christophe Chaza-

rein el Okcitanujo kaj Stefan MacGill el Hungarujo.

27 aprilo / tuttage: internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

27 aprilo-1 majo: seminario pri inturkultura komunikado kun Radojica Petrović el Serbujo

=> informoj rete en => gresillon.org/printempo

Jam pretas ankaŭ la somera programo:

Turisma semajno kun tuttagaj ekskursoj + Art-amatora semajno + Alternativa MOJOSejo.

Festa semajno por infanoj kaj familioj + Teatra aktora Semajno

De la 6^a de julio ĝis la 17^a de aŭgusto 2013

=> gresillon.org/somero

Marta Programo	
1 vendredo	18h00 - ĉe Librejo "LA FENICE" prezentado de du libroj de T. Soros 19h30 - kunestado kun tradukistino, eldonisto kaj gastoj en TEA-sidejo
5 mardo	16h00 - Unua- k dua-gradaj kursoj
8 vendredo	20h00 - Gramatikaĵoj el la itala revuo "L'Esperanto"
12 mardo	16h00 - Unua- k dua-gradaj kursoj
15 vendredo	20h00 - Legaĵoj el INFERO de Dante: komparo inter itala, esperanta kaj triesta versioj
22 vendredo	20h00 - El la Esperanta gazetararo
26 mardo	16h00 - Unua- k dua-gradaj kursoj
29 vendredo	20h00 - Floroj kaj fruktoj en Brazilo - fotoj de Edvige
Aprila Programo	
2 mardo	16h00 - Unua- k dua-gradaj kursoj
5 vendredo	20h00 - Legaĵoj el INFERO de Dante: komparo inter esperanta, itala kaj triesta versioj
9 mardo	16h00 - Unua- k dua-gradaj kursoj
12 vendredo	20h00 - Niaj poetoj kaj verkistoj
19 vendredo	20h00 - Babilado en Esperanto!
26 vendredo	Sidejo fermita
Maja Programo	
3 vendredo	20h00 - Legaĵoj el INFERO de Dante, esperante, itale kaj triestadialekte
7 mardo	16h00 - Unua- k dua-gradaj kursoj
10 vendredo	20h00 - Preparaĵoj por Alp-Adria Konferenco

< daŭrigo de la 2-a paĝo

❖ Pri ekstera informado:

3 majo - ĉe Tele4 oni intervjuis Edvige-n pri agadoj de Kulturasocio F. Schiller kaj TEA; je **la 13^a de decembro** ĉiam ĉe Tele4, ŝi parolis kune kun la prezidantino de la Greka Kultura Fondaĵo pri la Kristnaska Ekspozicio de geknabaj desegnaĵoj.

9 oktobro - Davide Pittoni, ĵurnalisto de "La voce di Trieste" intervjuis nin pri Esperanto kaj TEA.

Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis sendataj dum la jaro al radioj kaj lokaj ĵurnaloj.

Alirprogramoj de RADIO UNO: daŭras la ĉeesto de TEA en la aliprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 8 elsendoj pri diversaj temoj esperantaj.

TEA-Bulteno - 6 fojojn en la jaro aperis la asocia informilo, en sia kutima 6-paĝa konsisto. Ĝi estas regule dissendata al ĉiuj membroj de TEA, ĉu papere ĉu rete, kaj ankaŭ al pluraj esperantistoj/grupoj tra la mondo. Tre aprezata, ĉefe de eksterlandanoj, estas la rubriko „Paronimoj“, zorgita de nia kara, ĉiam tre vigla, Viglo.

Per ĉi lasta informo finiĝas mia agadraporto. Dankon pro via pacienca aŭskultado. *Edvige Ackermann*

Uno per tutti ... cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

*Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che
possono ricevere questo contributo.**

Come fare ?

È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2012 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale
dell'Associazione Esperantista Triestina**

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA

Il Presidente

(Edvige Ackermann)

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320